



Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

Arbarista Panteono

Prelegos: Miroslav Hruška

Esperanto: Arbarista Panteono estas unika regiono norde de Brno administrata de „Lerneja forsta entrepreno Křtiny“, kiu estas sub Mendel-universitato. Pro sia unikeco oni povas diri, ke temas pri monda raraĵo. En regiono de arbaroj, akvoj kaj deklivoj troveblas multaj monumentoj, akvofontuoj kaj aliaj interesaĵoj. Ne ĉiu homo ja scias pri ĝi kaj tial estas kreata sendependa retejo pri tiu ĉi retejo sur retadreso www.lesnickyslavin.cz, kiu nun estas en la ĉeĥa lingvo kaj parte ankaŭ en esperanto.

Iniciatoro kaj administranto de retejo Miroslav Hruška en sia prelego parolos pri plej interesaj lokoj de tiu ĉi regiono, ofertos proponojn por ekskursoj kaj eble ĉe prezentos freŝan novaĵon en la retejo.

Ĉeesta programo. Ĝi estas registrota

Lingvo: Esperanto

Kiam: la 17-an de majo 2022 je la 18-a h.

Kie: Občanský klub, [Hybešova 65a](#), Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybešova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la [mapon](#). La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)



Cetera programo en majo

La 21-an Vizito al Esperantista klubo en Šumperk. Kiu volas vojaĝi, mi petas, ke li skribu al mi (ankoraŭ neniu skribis, ke li vojaĝos).

La 24-an *La programo ankoraŭ ne estas fiksita*. Rete per Skajpo

La 31-an **Historio de Ukrainio** – Oldřich Arnošt Fischer. Občanský klub, Hybešova 65a

Mi petas vin, ke vi proponu programon por resto de majo kaj junio. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos.



Ni rekomendas

- **Novajo!** Verŝajne okazos ĉeestaj **KER ekzamenoj** novembre en **Bartošovice**. Se mi ekscios pli, mi skribos al vi.
- Tradiční jarní setkání Šumperského esperantského klubu, tentokrát v Šumperku (sobota 21. května)
- La 9-an de junio **Festo de 30 jarojn den eldonejo Kava-Pech**. Prago, je 17-a h.
- Trapasu **KER ekzamenon** rete. La retaj ekzamenoj okazos (ĉiam kompleksa, skriba, parola): C1 18a de junio 2022, B2 25a de junio 2022, B1 2a de julio 2022. Pli da informjn kaj aliĝilon trovu ĉe <https://edukado.net/novajhoj?id=871>.
- Ekde septembro Adam Mickiewicz Univerŝitato en Poznano planas lanĉi novan tipon de studado. Temas pri du jara ĉeesta **magistra studado**, fako **Interlingvistiko** kadre de

Lingvistiko kaj informmanaĝado. La studadoj estos en la angla kaj en Esperanto (ambaŭ lingvoj bezonataj). **Studprogamo estas alkroĉita**. Por pli da informoj bonvolu kontakti prof. Ilona Koutny (ikoutny@amu.edu.pl)

- Vizitu **Arbaristan Panteonon**, belegan lokon tuj apud Brno. Reto de firmaj arbaristaj vojoj taŭgaj por promenoj, biciklado kaj promenoj kun infanĉaretoj, belegaj diversspeciaj arboj apude, monumentoj kaj akvofontoj (bedaŭrinde pro longa seko nur kelkaj kun akvo). Propagandisto te tiu ĉi regiono estas esperantisto Miroslav Hruška. La retejo estas ankaŭ esperantlingva. Se vi ĵus ne estas fermita hejme pro la ĉina malsano, iru eksteren kaj promenu en aŭtuna naturo. Faru ion por via sano. La regiono estas atingebla rekte el Brno per publika transporto.
- La 9-17-an de Julio, 2022 **56-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj**, KLAIPĒDA, Litovio
- La 16-an – 18-an de Septembro 2022 **Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**, Pardubice



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobrna.cz/index.php/eo/aprogramo>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brna)

Milan Kolka
prezidanto